

Volumo 60, Numero 2, aprilo 2025

Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio
Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else

Ekscita projekto por kreskigi nian organizaĵon, kaj Esperantujon

Jonathan Cooper, Prezidanto de EFNSK

Esperanto NSW antaŭnelonge prenis oportunon partopreni en servo provizata de entrepreno, Practera, por neprofitcelaj organizaĵoj.

Practera liveras programon partnere kun aŭstraliaj universitatoj, por ebligi aŭstraliajn neprofitcelajn organizaĵojn konekti kun teamoj de studentoj por fari merkatan esploron, kaj taksu tiujn organizaĵojn laŭ socia, media kaj financa perspektivoj.

El pluraj eblaj proponitaj strategioj, ni elektis la “Kreskan Strategion”, ĉar ni volas pliigi la nombron da esperantistoj kaj membroj de Esperanto NSW.

Nia projekto – kun studentoj de University of Southern Australia Professional Business Project – havas tri celojn:

Celo 1: Analizi la nunan situacion de lingvolernado, internaciajn kulturojn, kaj komunuman engaĝiĝon por determini tendencojn rilatajn al Esperanto NSW.

Taskoj:

- Esplori tendencojn en lingvolernado, inkluzive de popularaj lingvoj, lernmetodoj (reta aŭ ĉeesta), kaj instigoj por lingvoakiro.
- Esplori la nunan intereson pri internaciaj kulturoj kaj komunumoj en Sidnejo kaj Aŭstralio.
- Analizi demografiajn datumojn kaj diskutojn en retaj forumoj, por kompreni la bezonojn kaj preferojn de eblaj Esperanto-lernantoj kaj membroj.
- Trovi sukcesajn strategiojn uzatajn de aliaj lingvaj organizaĵoj aŭ kulturaj grupoj por allogi kaj retenigi membrojn.
- Prepari raporton, resumante ĉefajn rezultojn, montrante oportunojn kaj defiojn por Esperanto NSW.

Celo 2: Ekzameni kiel similaj organizaĵoj (lingvaj, kulturaj aŭ komunumbazitaj) adaptiĝas al ŝanĝiĝantaj bezonoj kaj merkataj tendencoj, determinante plej bonajn praktikojn aplikeblajn al Esperanto NSW.

Taskoj:

- Trovi organizaĵojn kun similaj celoj (antaŭenigi lingvojn, kulturojn aŭ komunuman engaĝiĝon) en Aŭstralio kaj eksterlande.
- Esplori ilian interretan ĉeeston, merkatajn strategiojn, membromodelojn kaj komunumajn engaĝiĝojn.
- Analizi iliajn mezurojn de sukceso (ekz-e reteja trafiko, engaĝiĝo kun sociaj amaskomunikiloj, kresko de membraro) kaj determinu la faktorojn de sukceso.
- Taksu la fareblecon adopti similajn strategiojn por Esperanto NSW, konsiderante ĝiajn unikan kuntekston kaj rimedojn.
- Dokumenti la rezultojn en raporto, inkluzive de ageblaj rekomendoj por Esperanto NSW.

Celo 3: Esplori sukcesajn eksterajn merkatajn strategiojn, kiujn Esperanto NSW povus uzi ĉe la ekstero de siaj du konstruaĵoj (Esperanto-Domo kaj la konstruaĵo de Lt Eveleigh St), por kapti la intereson de preterpasantoj, kaj instigi tiujn esplori la lernadon de Esperanto kaj engaĝiĝi kun la organizaĵo.

Taskoj:

- Esplori ekzemplojn de efikaj konstruaĵaj eksteraj merkataj strategioj uzataj de edukaj institucioj, kulturaj organizaĵoj kaj entreprenoj, por altiri atenton kaj diskonigi sian mesaĝon.
- Analizi la dezajnon, mesaĝadon kaj lokigon de signoj kaj aliaj eksteraj merkataj elementoj en tiuj ekzemploj.
- Konsideri la specifan kuntekston de Esperanto-Domo kaj la konstruaĵo de Lt Eveleigh St, inkluzive de kutimoj de preterpasantoj, najbara demografio kaj lokaj regularoj.
- Cerbumi pri eblaj eksteraj merkataj strategioj, kiuj povus esti efektivigitaj sur la konstruaĵoj, kiel okulfrapaj signoj, interagaj ekranoj, artaj instalaĵoj aŭ reklamaj eventoj.
- Prepari raporton skizantan eblajn merkatajn strategiojn, inkluzive de vidaj modeloj, kostotaksoj kaj rekomendoj por efektivigado.

Jen la tempoplano de la projekto:

La informkunveno pri la projekto okazis per Zoom la 26an de marto.

La projektplano estos liverita je aŭ antaŭ la 11a de aprilo.

Malneta raporto estos liverita je aŭ antaŭ la 9a de majo.

Fina (skribita) raporto estos liverita je aŭ antaŭ la 26a de majo, kaj prezento de la raporto (per Zoom) okazos dum tiu semajno (27–30 majo).



Ni planas prezenti la rezultojn en estonta numero de Telopeco.

Association for Good Government akceptis prelegon pri Esperanto

Dmitrij Luŝnikov, estrarano de EFNSK

La 12-an de marto 2025 okazis interesa evento ĉe Henry George House (122 Little Eveleigh Street, Redfern) de la Association for Good Government. La du hora prelego estis aranĝita kiel kunlaboro kun Esperanto NSW kaj nia gasto el Germanio, D-ro Rainer Kurz, detale prelegis pri Esperanto tie.

En sia senpaga du-hora leciono, li kovris la jenajn:

- Faktoj kaj baza ideo de Esperanto
- Historio de Esperanto
- Forto kaj malfortoj de Esperanto
- Prononco
- Gramatiko
- Vortprovizo
- Kiel uzi Esperanton en Sidnejo
- Kiel uzi Esperanton dum vojaĝoj
- Kiel uzi Esperanton, se vi ne ŝatas forlasi la hejmon
- Kiel fariĝi Esperanto-fakulo
- Kiun influon Esperanto povus havi al la bonfarto de la mondo.



Antaŭ la evento multaj membroj de la Association for Good Government dubis ke Esperanto povas funkcii kaj ke ĝi povas havi ion bonan influon al la mondo. Tio tute ŝanĝiĝis dum la prelego. Multaj demandoj de la ĉeestantoj montris la grandan intereson kaj unu persono rekte esprimis intereson eklerni Esperanton.

Rainer Kurz, komence lernis Esperanton dum 20 horoj ĝis li faris sian unuan Esperantan vojaĝon (al Japanio). Ekde tiam li ekuzis Esperanton por vojaĝi al pli ol 40 landoj.

Laŭ mi, disvastigi Esperanton per partoprenado en eventoj de aliaj senprofitaj organizoj estas efika kaj kreema maniero atingi pli vastan publikon. Por tio lokaj E-organizoj povus:

- Konekti kun lokaj senprofitaj organizoj, proponi kunlaboron kaj montri kiel Esperanto povas kontribui al iliaj celoj.
- Distribui broŝurojn, flugfoliojn, kaj aliajn materialojn, kaj proponi sekvajn aktivadojn, kiel mini-lecionojn.
- Proponi vin mem kiel parolanto ĉe seminarioj, konferencoj, aŭ aliaj eventoj, kie temas pri edukado, kunlaborado aŭ kulturo.
- Diskuti pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ĝia rolo en interkultura komunikado.
- Uzi ankaŭ sociajn retojn por promocii eventojn. Tio helpus atingi pli vastan publikon.
- Inviti gvidantojn de aliaj organizoj al Esperanto Domo. Tio povus helpi krei intereson pri Esperanto.

Tiel maniere, ni povus ne nur disvastigi Esperanton, sed ankaŭ pligrandigi konscion pri interkultura komunikado kaj kunlaboro en diversaj komunumoj.

Kongreso de Esperanto kaj Somerkursaro en Adelajdo: miaj impresoj

Sophie Kitney, membro de EFNSK

Mi amis la semajnon ĉe la kongreso en Adelajdo en januaro, la semajno superis miajn atendojn.

Dankon al ĉiuj, kiuj multe laboris por organizi ĉi tiun kongreson.

Mi lernis multon en la ĉiutagaj klasoj, Esperanto-kurso - komencanto.

Sandor estis mirinda instruisto kaj la klasoj estis amuzaj, fotoj alfiksitaj.

Mi estas inspirita plulerni Esperanton kaj mi antaŭĝojas pri la venonta kongreso en Aŭklando.



Muziko - ĉu vere internacia lingvo?

Anders Ernest, membro de EFNSK

Por ni, esperantistoj, la temo, la demando, de la internacia lingvo estas gravega. Vere, nia Esperanto estas internacia lingvo. Ĉu, tamen, muziko estas internacia lingvo, unumaniere aŭ alie? Mi estas muzikisto, (mi ludas violonon) kaj ankaŭ (kompreneble) esperantisto. Tial estas por mi la temo de muziko kiel internacia lingvo vere plej grava.

Evidente, muziko ne povas esti nomita kiel internacia lingvo kiel Esperanto. Sed homoj kiuj diras ke “muziko estas la vera internacia lingvo” ne intencas doni al la esprimo tiun signifon. Ili intencas, ke muziko konektas nin, sen lingvoj, sen vortoj, kaj sen vera peno. Estas bona idealo, sed falsa. Plia malboneco en ĉi-tiu idealo estas ke ĝi forskrapas kaj forlasas la diversecon de kulturoj muzikaj (kaj fakte senmuzikaj) en la nia mondo grandega.

Oni nur bezonas aŭdi muzikon el kelkaj aliaj kulturoj por vidi ke muziko ne estas sama el unu kulturo al alia. Jes, ofte povas ĝi komprenata esti de homoj, de kies kulturo la muziko ne venas, sed ofte ankaŭ ne. Ekzemple: aŭskultu muzikojn 1-e. gamelanan (el Indonezio) 2-e. de la Pekina Opero (el Ĉinio) kaj 3-e. Karnatika (el la sudo de Barato). La tri muzikstiloj estas ĉiuj aziaj (nur unu mondparto!). Vi povus tamen

aŭdi ke la tri muzikpecoj vere ne samas. Fakte laŭ multaj homoj la tri estas tute ne kompreneblaj. Sed ili ne nur ekzistas, ili estas vere altaj, tradiciaj, kaj amataj muzikstiloj. Muziko ne komprenata estas el unu loko al alia. Kial povas esti muziko internacia lingvo?

Grave, ekzistas ankaŭ multaj homoj kiuj neniam aŭskultas muzikon. Iliaj rezonoj kaj kialoj estas diversaj. Mi persone havas amikon, islamano, loĝanta en Aŭstralio, kiu kredas ke instrumentala muziko estas malbona por spirita saneco. (Mi devas diri ke islamanoj havas diversegajn opiniojn pri la temo de muziko kaj mi konas aliajn islamanojn kiuj estas, fakte, muzikistoj). Ekzistas ankaŭ homoj por kiuj muziko estas nur sono (dismuzikanoj) kaj ni bezonas ne forgesi surdulojn, kiuj vivas ofte bonege, tamen sen la kompreno de muziko de aliaj kiuj bone aŭdas. Kvankvam dismuzikanoj kaj surduloj ambaŭ povas ofte aŭdi partojn de muziko, ili ne aŭdas ĉiun sencon de la muziko. Rigardante ĉi-tiujn homojn, kiuj vivas kaj konsekvence estas prizorgitaj, oni ne povas nomi muzikon “internacia lingvo”.

Mi esperas, ke vi nun vidas la kialojn, pro kiuj la muziko (kiun mi amas kaj ludas ofte) ne estas vere internacia lingvo. Ŝance, feliĉe, hazarde, havas ni internacian lingvon, la nina karan Esperanton. Ni devas ne provi uzi la muzikon en tiu pozicio, al kio ĝi ne taŭgas.



Diamanta pitono

Jean Werk, membro de EFNSK

Sur la terpecego de nia hejmo, eblas vidi ĉiajn faŭnojn. Diamantaj pitonoj estas unu el la oftaj. Mi ĉiam pensis, ke la pitonoj ne manĝas gekokojn. Tia ideo estis el artikolo de DPI, kiun mi legis antaŭ kelkaj jaroj. Kaj mi kredis ĝin pro ĝia respektblo.

Akcidento kiu okazis ŝanĝis mian penson. Antaŭ kelkaj semajnoj ses novaj koketoj elkoviĝis, sane kaj bele. Malrapide kaj iompostiome la koketoj ekmalaperis, unu post alia en la monatoj. La alian matenon, el la du restantaj, unu koketo estis nevidebla. Mi serĉis la kokejon tute. Tie la pitono bobeniĝis kaj kuŝis en la skatolo kie kokinoj metis ovojn!

Mi tuj telefonis nian bonan amikon kiu estas serpento kaptisto, dum mi kuris al mia edzino por diri al ŝi la situacion.

Kelkajn horojn poste nia amiko, la serpento kaptisto alvenis. Lerte li tenis la pitonon ĉe ĝia mezo, li alportis ĝin al ni, “Kien vi volas meti ĝin?”. Kvankam ŝanceliĝita en lia mano, la serpento estis ne tre kolera. La bulo estis videbla en la tre longa korpo. Mia edzino indikis al fajrlignejo apude. La serpento rapide forglitis kaj malaperis dum du el ni staris fore.

La afero estas interesa, la aliaj grandaj kokegoj ne estis maltrankvilaj dum la serpento kuŝis en la skatolo.

Evidente, la indiĝenaj pitonoj ja povas preni koketojn, kaj do estis konfirmita per mia Google serĉo, tamen ne grandajn gekokojn. Nun, kie estas la truo? Memoru, la kokinejo estis riparita lastatempe.





EFNSW: Esperanto Domo

Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno

1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj

Kontaktu Roger (02) 9976 6320 manly@esperanto.org.au

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 newcastle@esperanto.org.au

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.

Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:

Esperanto Domo,

143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;

Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00

(*Sonigu elektran zumilon ĉe la strato*)

www.instagram.com/esperanto_nsw/

www.facebook.com/EsperantoNSW/

www.EsperantoHouse.org.au

retadreso: nsw@esperanto.org.au

Prezidanto:	Jonathan Cooper
Vic-prezidanto:	Joanne Cho
Sekretario:	Nicole Else
Kasisto:	Dmitry Lushnikov
Estraranoj:	Terry Manley, Greg Cooper, Mark Rodowicz

